




Gejsero en norda Nov-Zelando



Esperanto sub la Suda Kruco

Julio-Aŭgusto 2002
Numero 58 (vol. 10, no. 4)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio
Numero 58 (volumo 10, numero 4), Julio-Aŭgusto 2002

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:
libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road, Oakey
Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi el-kovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo:

La varmegakvaj gejseroj de Nov-Zelando estas grava allogaĵo por turistoj. Ĉi tie la naturo ankoraŭ povas senĝene prezenti al la homaro sian potencon kaj kapablon plu regi la mondon.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Intervjuo kun Margaret Chaldecott (Terry Manley)	3
Pri la instruado de Esperanto al infanoj (Ronald Gates).....	6
Nia konkurso: rezultoj.....	13
NZEA kongreso 2003	13
Ret-eldono de <i>Australian & New Zealand Esperanto Dictionary</i> (Donald Rogers)	14
For the Beginner	15
Computer Operating Systems ..	15
Esperanto Style	16
Auxiliary Verbs	17
Perdita en spaco (Terry Manley)	19
Survoje al Kanbero (Franciska Toubale)	20
Somerkursaro 2003	21
Nova klerulo: Ron Gates (Marcel Leereveld).....	22
Skribas la legantoj: Donald Rogers ..	22
El la regionoj.....	23
Nekrologo: John Moore (Kay Andersen)	24
Interrete.....	25
Spertoj en Japanio (Dianne Lukes) ..	27
Mallonge	28
Duobligado	28
Jacques Chirac	28
Astronomio	29
OpenOffice.org	29
Lingvoj kaj homaj rajtoj	29
Odlo Bokserp: Liaj paĝoj	30

ENK estas legebla per Interreto:
<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la septembra numero: 15 aŭgusto.

Konu viajn gesamideanojn

Intervjuo kun Margaret Chaldecott, sekretario de Esperanto-Federacio de NSK.

*Dankon, Margaret, pro viaj respondoj.
Nu, kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Northbridge (Sidnejo), kontraŭ la golfejo, en la gepatra domo.

Ĉu vi havis gefratojn?

Jes, Johano kaj Jennifer. Jennifer estis iomete malsana pro digestmalordo kaj astmo, kaj pro tio ni translokiĝis al Lindfield en aŭgusto 1939. Johano, la dua infano, iĝis inĝeniero. Je lia naskiĝo, paĉjo donis al panjo oran brakhorloĝon — ĉu gratuldanko, aŭ lastapremio? [Ŝi demandis al si.] Jennifer iĝis tre artema — ŝi pentris kaj desegnis por malgranda teatro, iĝis fotomodelo, kaj lastatempe laboris kiel remburisto en Londono.

Vi estas volontulo pri multaj aferoj. Ĉu vi povas doni skizon pri tio?

Mia patrino estis ano de VAD [Voluntary Aid Detachment, branĉo de la Ruĝa Kruco], kaj mi iĝis volontulino frue dum la milito. Mi kaj la fratino helpis en ripozejo por soldatinoj, en George St, kontraŭ la Ĝenerala Poŝt-Oficejo, en la tiama magazeno David Jones. Mi helpis ankaŭ en ripozlokoj por soldatoj apud St Andrews, en Hyde Park, kaj en The Rocks. Poste mi estis dum kelkaj jaroj en la skota ruĝkruca VAD.

Post la reveno el Londono al Aŭstralio, mi iĝis volontulo ĉe Wesley kiel instruisto pri, unue, Esperanto, kaj

poste pri trikado. Mi helpis ankaŭ pri AMES [Adult Migrant Education Service] al kelkaj novaj enmigrintinoj kaj helpis la profesion instruistino por ESL [English as a second language] en nia loka adventista preĝejo. Mia lastatempa laboro kiel volontulo estis dum la Paralimpikaj Ludoj en Sidnejo en 2000.

Vi estas aktivulo pri Sepataga Adventismo; ĉu viaj gepatroj estis adventistoj?

Mia patro, kiu naskiĝis en Anglujo, estis adepto de la anglikana eklezio. Li alvenis el Londono al Aŭstralio ĉ. 1910. Panjo naskiĝis en Inverell, en skotdevena familio, kaj estis ano de la skota (presbiteriana) eklezio. Kiel infanoj ni frekventis la anglikanan, kaj poste mi frekventis la skotan. Post mia reveno el Londono, mi ne aktivis ĝis mia edziniĝo. Pat, mia edzo, kaj mi studis la detalojn de Adventismo.

Kiel adventisto vi estas vegetarano, ĉu ne?

La sanmesaĝo de la adventista eklezio rekomendas ke anoj ne manĝu la karnon de bestoj kiuj manĝas aliajn bestojn. Do ni ne manĝas krabojn, salikokojn, ktp; nek porkaĵon. Sed Pat, kiu frue estis fortulo kaj ofte diris ke li povus “manĝi ĉevalon”, malsaniĝis post severa vundo kaj iom post iom forlasis viandon. Do ne estis malfacile tute eviti la karnon de fiŝoj aŭ bestoj, sed ni plu manĝis ovojn, trinkis lakton, kaj ŝatis fromaĝojn. La odoro de

viando por la hundo kaj la kato ne plaĉis al mi!

Inter la adventistoj, ĉu vi iam trovas sampensulojn pri la ideo de Esperanto?

Jes, estas granda nombro da adventistoj en la esperanta movado — vi trovos liston en la *Jarlibro* de UEA. Unu estas S-ro Edwin de Kock, el Sud-Afriko, kiu verkis poezion. Mi renkontis lin kaj aliajn dum la UK en Norvegio. Tie ni diskutis la eblecon de adventista esperanta grupo, sed mi ne scias ĉu io rezultis el tiuj diskutoj.

Ĉu alie Esperanto plenumas rolon por vi inter la adventistoj?

Mi ofte uzas la esperantan Biblion dum mi legas la semajnan studlibron, se vortoj aŭ frazoj ne estas klaraj. Tiel kelkfoje mi povas prezenti “novan” ideon al la estro de nia grupo.

Vi havas multajn interesojn: trikadon, hundojn, ĝardenon, korespondadon, ktp. Kiam kaj kiel vi havis tempon lerni Esperanton?

Mi trikis multajn jarojn antaŭ ol mi komencis studi Esperanton. Ĉiam en la domo estis hundoj, pri kiuj mi povus skribi libreton. La ĝardeno suferas multe pro la aliaj ŝatokupoj; kaj ankaŭ suferas korespondado. Alia intereso estas krucvortenigoj, ĉefe la “kripta”, kaj pro tio mi jam konis la vorton Esperanto frue. Sed mi decidis lerni ĝin nur en Londono. Mi volis reveni per ŝarĝoŝipo, kun haltoj, espereble, en multaj lokoj. Mi ne volis lerni multajn lingvojn. Mi jam iomete konis la latinan kaj la francan, ekde la lernejojaroj, kaj la germanan kiun mi studis en Londono. Do la respondo estis klara — lernu Esperanton. Post nur 6 aŭ 8 monatoj, venis voko al ŝipo, do dum la vojaĝo hejmen mi daŭre

studadis kaj tuj post la alveno ĉi tie mi serĉis la Sidnejan grupon kaj ĉeestis kursojn sub gvidado de la kara Fritz. Nun mi volas verki pri la internaciaj simboloj kaj frazoj pri trikado, tiel ke ĉeestantoj de UK povu facile aĉeti trikolibrojn en la UK-lando. Sed pro manko de tempo, la afero atendas...

Vi vizitis Kubon. Kiom da fojoj kaj kiam vi estis tie?

La unua vizito al Kubo estis en 1990, por ĉeesti la UK-on. Tiam estis tuj post la morto de Pat (li grumblis kiam mi iris al Islando kaj Ĉinio!). Mi registris min malfrue, do skribis al la adventista preĝejo tie por sciigi ĉu estas persono en La Habana kiu volos/povos bonvenigi min. Tiel mi renkontis la ĉarman Coralia-n. Tri vizitoj sekvis, en 1992, 1993 (mi revenis post la incendioj), kaj en decembro 2000. En tiuj jaroj mi vidis kiel la adventista eklezio kreskis en la tielnomata ateista komunista lando.

Vi studas la hispanan. De kiom da jaroj?

Pro la vizitoj al Kubo mi volis lerni la hispanan. Sed spite de la diraĵoj de multaj, ne estas facile uzi Esperanton kiel pontlingvon al tria lingvo. En la hispana la verbformoj estas klare latinaj — la verbo mem montras la tempon kaj nombron da agantoj. Kaj estas ŝanĝoj inter literoj por teni la prononcon. Kaj oni ne prononcas la literon H kvankam ĝi aperas. Kaj... Tiuj kiuj strebas lerni la anglan ricevas mian simpatian.

Ĉu vi havas kontakton kun hispanlingvuloj nuntempe?

Dum la pasintaj 4-5 jaroj mi ĉeestis la klasojn pri la hispana en Wesley Centre. La instruisto dum la pasinta jaro estas ano de la adventista eklezio

en Ĉilio, kaj dum la finaj tri monatoj ni devis prezenti receptojn el diversaj landoj. Mi tajpis kaj donis la tuton al la aliaj klasanoj.

Kiaj estas viaj esperoj por Esperanto en via urbo, provinco, lando...?

Mia espero por Esperanto estas ke pli da personoj povos vidi preter siajn nazojn kaj pensojn kaj konstati ke Esperanto estas facila, utila, ĉarma lingvo kaj ke ĝi neniel superregas ies hejmlingvon. Ĝi donas eblecon vojaĝi, legi tradukitajn kaj originalajn verkojn kiuj ne estas haveblaj en la denaska lingvo. Ĝi helpas kompreni la pensmanieron de aliuloj (legu la libron *25 paŝoj* kun la diversaj aŭtoroj). Ankaŭ ĝi helpas plibonigi onian konon de onia propra lingvo, kaj eble uzi aliajn metodojn esprimi oniajn pensojn. (Legu la libron *Kanako*, kun la uzo de adverbaj formoj de verboj — vi ĉesos fari la multajn erarojn kiuj aperas tiel ofte en la angla). Sed, ho ve, ĝis ni povos prezenti nin kiel instruistojn kun diplomoj, la instancoj ne akceptos nin por instrui en la lernejoj. Do Esperanto restus nur hobia. En la mondo multe da mono malaperas kiam oni devas traduki internaciajn protokolojn kaj rezoluciojn de UN kaj ties fakoj en multajn — kelkajn de ne multaj parolantoj — lingvojn.

Vi estas instruisto, ĉu ne?

Mi instruas pri trikado. Mi instruis Esperanton en Wesley, kaj la anglan al eksterlandanoj — AMES (Adult Migrant Education Service). Sed nun ne plu Esperanton.

Al kiuj vi instruas?

Mi instruas al sinjorinoj pli ol 50-jaraĝaj. Ĉinaj, filipinaj, japanaj, germanaj, indoneziaj, kaj sendube kelkaj

aŭstralianaj, en Wesley.

Enmigrantoj tuj komencas lerni la anglan. Ĉu vi opinias ke por enmigrinto valoras lerni Esperanton por faciligi la lernadon de la angla? Aŭ ĉu mankas tempo, kaj konfuziĝus la lernantoj?

Enmigrintoj estas en kelkaj grupoj. La edzino, kiu zorgas pri la domo kaj infanoj dum la edzo laboras, ofte ne rekontas anglaparolantojn kaj por ili la angla estas la plej grava afero. Kaj kiam la infanoj frekventas lernejojn, estas urĝe ke panjo komprenu kial la idoj devas fari “hejmtaskojn”, kaj estu kapabla helpi ilin. Ofte estas problemoj en la lernejoj, do denove por ili la angla lingvo gravas. Por tiuj kiuj laboras en multlingva grupo, denove, por sekureco, la angla estas grava. Kaj estas alia grupo — tiuj kiuj ne atingis altan nivelon de lernado en la hejmlando. Estas malfacile instrui al ili aŭ la anglan aŭ Esperanton, ĉar ili ne havas bazan ideon pri la gramatiko, ktp. Do, enmigrintoj devas lerni la anglan unue, kaj se estas interesiĝo, poste instruu al ili Esperanton.

Ĉu ĝenas vin ke Esperanto ne plenumis gravan rolon en la mondo?

Jes, ĝenas min ke pro la stulteco de unupensuloj Esperanto ne gajnis la rolon kiun ĝi meritas en la mondo. Instruistoj kiuj dum 5 jaroj lernis instrui alian fremdan lingvon ne volonte forlasos spacon en lernejoj por tiu facila, ĉarma, ĝaja “hobia”.

Ni ĉiuj rimarkas ke la movado ne juniĝas (laŭ averaĝa aĝo) en Sidnejo. Kiaj estas la problemoj tiurilate?

Ni bezonas diplomitajn instruistojn por eniri la lernejojn ĉi tie. Do estus pli bone trovi lernontojn aliloke. Ekz, inter la geskoltoj. Ĉiujare estas ĵamboreo ie en la mondo. Mi proponis ke ni

skribu al la Esperanto-Skolta Ligo kaj petu detalojn. Bonŝance, ĉe volontula kunveno en decembro mi vidis budon por la skoltoj kaj prezentis al viro mian ideon. Li havas iom da aŭtoritato kaj ŝajnis interesata. Do mi skribos, petos informon, tradukos kaj sen-

dos detalojn — ĉefe pri la ĵamboreo en 2002 — al lokaj grupoj. Ni devos tiam trovi spertan instruiston en diversaj lokoj.

Dankon, Margaret.

[Intervjuis Terry Manley] □
El *Telopeco*

Pri la instruado de Esperanto al infanoj de Ronald Gates¹

Dum la jaroj 1998 kaj 1999 mi instruis Esperanton en antaŭlernejo. La klasanoj aĝis tri, kvar kaj kvin jarojn. Ilia nombro variis inter dek kvin kaj pli ol tridek.

Estus trafa demando, kiel mi, antaŭa instruisto kaj administranto je nur la universitata nivelo, troviĝis en tia situacio. Kaj la respondo devus esti, ke ne pro konstato de bezono aŭ oportuno, sed nur preskaŭ hazarde.

En tiu tempo loĝis en mia plej proksima urbo, Armidale en la nordo de Novsudkimrujo, unu alia esperantisto, laŭ profesio dentisto. Lia fileto vizitadis la lokan Montessori-antaŭlern-ejon. Frue en la jaro 1998 ties estraro akceptis la proponon de la patro, ke li instruu Esperanton al la infanoj. Li petis min helpi, kaj kompreneble mi konsentis. Tamen en aprilo, tuj antaŭ la unua leciono, li neatendite decidis ke mankas al li sufiĉe da tempo por plenumi sian proponon. Tion, do, devis mi sola fari.

Sekvis periodo de eksperimentado kaj iompostioma lernado, el kiu evoluis pli-malpli definitiva formo de la instruado. En tio multe helpis la

kunlaborado en la dua jaro de mia edzino Barbara.

La lecionoj okazis unu fojon semajne, kaj daŭris ĉirkaŭ duonon de horo. En la malfrua parto de 1998, pro la kresko de la lernantaro, mi devis dividi la klason en du kaj ripeti la lecionojn.

La infanoj sidis sur la planko en pluraj vicoj. Ĉe nia eniro ekaŭdiĝis junaj voĉoj: “Saluton, Ron! Saluton, Barbara! Saluton! Bonan matenon! Bonan tagon!”. Ni eksidis sur seĝoj jam lokitaj antaŭ la klasanoj. Sekvis kuna kalkulo de la alestantoj. La nov-alvenintoj rapide lernis reciti kun la aliaj: “Unu, du, tri, kvar...”, dum per unu mano mi elmontris grandan kartonpecon portantan la ciferojn kaj ties vortigon, kaj per fingro de la alia indikis laŭvice la infanajn kapojn.

Mi variigis la ordon de la aliaj lecioneroj. Ĉefaj inter ili estis kantado, ludoj kaj la prezentado de ilustritaj rakontetoj, kvankam de tempo al tempo mi ankaŭ enkondukis arojn da simplaj esprimoj jam skribitaj grandlitere sur blanka kartono.

Bedaŭrinde io en la kredo de la

1. Ĉi tiu eseo utiligas materialon el prelego farita en simpozio pri “Esperanto en la klasĉambro”, okaze de la tria kuna kongreso de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj en januaro 2000.

montessorianoj malpermesis la uzon de televido, inkluzive de vidbendoj eĉ de la kvanto kaj utileco de *Mazi*. mi rimarkis ankaŭ ke komputilo de la marko Apple restas sur flanka tablo en la ĉefa klasĉambro, laŭŝajne neniam uzita. Kaj eĉ mankis al la klasĉambroj nigraj kaj blankaj tabuloj, pro kio mi devis kunporti jam preparitajn elmontrilojn. Ia kompenso pro la manko de vidbendkapablo konsistis en tio ke estis necese teni la atenton de la infanoj per daŭra aktiveco iliaflanke, ĉu fizika, ĉu mensa — kio sendube stimulis la lernadon.

Ni uzis precipe du formojn de ludo.

Unu estis “Simon diras”. La listo de agoj estis sufiĉe granda. “Ekstaru!” “Tuŝu la nazon!” “Manojn sur la kapon!” “Levu la manojn!” “Mallevu la manojn!” “Saltu!” kaj, tuj post tio pro la plankoŝanceliĝo, “Ĉesu!” “Eksidu!” “Fermu la okulojn!” “Malfermu la okulojn!” “Skuu la kapon!” “Montru kvin fingrojn!” “Diru Saluton!” Komence, kune kun ĉiu parolata komando mi montris kartonpecon surhavantajn kaj la vortojn kaj simplajn ilustraĵojn. Poste mi ofte nur diris la komandon, kun aŭ sen la antaŭa “Simon diras”.

Por la alia ĉefa ludoformo mi preparis tridek kvar grandajn kartojn. Duono de ili portis majuskle la nomon de objekto: arbo, aŭto, aviadilo, birdo, domo, floro, horloĝo, hundo, kato, knabino, knabo, libro, ponto, pordo, robo, seĝo, tablo. Sur la ceteraj dek sep mi faris kolorajn desegnojn de tiuj objektoj. Per la kartoj eblis diversaj ludoj. Ni povis disdoni la bildkartojn kaj elmontri unu post alia la nomkartojn, por ke ĉiu infano tenanta vorton sin parigu kun tiu tenanta la respondan bildon. Kaj ni povis simple montri vortkarton, demandante “Kio estas ĉi

tio?”, kaj vidi kun ĝojo la pli klerajn el la klasanoj sonigi la literojn, ĝis ili prononcis kaj komprenis la nomon.

La infanoj ŝatis rakontetojn. Komence mi skribis angle kaj tradukis en Esperanton simplan version de *Orharulino kaj la tri ursoj*, kaj prezentis ĝin en la du lingvoj. Mi ankaŭ tradukis el libretoj el la lerneja biblioteko kelkajn ilustritajn rakontojn, kiujn la klasanoj jam bone konis en la angla.

Tamen mi trovis multe pli efike mem verki taŭgajn rakontetojn en Esperanto, kaj prezenti ilin kun ĉiu mallonga frazo skribita preslitere sur granda folio kaj tie ilustrita kolore. (Kelkajn el la ilustraĵoj faris talenta nepino mia, la ceterajn mi mem.) Estis necese la unuan fojon doni plenan tradukon en la anglan, frazon post frazo. Sed, ĉar la infanoj ŝatis ripeton de konataj rakontoj, eblis la duan aŭ trian fojon grandparte preterlasi tradukadon kaj eĉ fari, de tempo al tempo, demandojn pri la signifo aŭ sekvo de iu bildo. La tekstojn, sed ne la ilustraĵojn, de dek el tiuj rakontetoj mi prezentos en aldonaĵo al tiu ĉi eseo.

Eĉ pli ol rakontojn la klasanoj ĝuis kantadon. Plurajn el la kantoj mi trovis en eldonita kolekto en Esperanto.

La infanoj aparte ŝatis *Mortis la koko*, kaj fakte prezentis ĝin antaŭ granda aŭdantaro de familianoj kaj amikoj okaze de la lerneja kristnaska festo fine de 1998. La kanto tekstas: “Mortis la koko, mortis ĝi. Mortis la koko, mortis ĝi. Ne plu kantos ĝi, koko-di, koko-da. Ne plu kantos ĝi, koko-di, koko-da. Koko koko koko koko-di, koko-da. Koko koko koko koko-di, koko-da.” La melodio estas jena:

Musical score for 'Esperanto sub la Suda Kruco'. It consists of three staves of music in 4/4 time, featuring a melody and accompaniment. The key signature has one flat (B-flat). The chords indicated below the notes are F, C7, and F.

La tekston mi skribis sur granda kartonpeco, por ke la infanoj konatiĝu kun la aspekto de la vortoj. Por instrui la melodion mi uzis malgrandan elektronikan klavinstrumenton, kiun mi trovis en la ĉefa klasĉambro.

Alia ŝatata kanto estis *Ruĝa pomo*, kiu uzas la melodion de *Frère Jacques*:

Musical score for 'Ruĝa pomo'. It consists of one staff of music in 4/4 time, featuring a melody. The key signature has one sharp (F-sharp). The chords indicated below the notes are G, D7, and G.

La unua strofo tekstas: “Ruĝa pomo, ruĝa pomo, estas ĝi, estas ĝi. Pomo estas frukto, pomo estas frukto. Frukto, jes! Frukto jes!” Krom la originalaj tri objektoj (ruĝa pomo, nigra kato, blua tablo) mi aldonis ses aliajn (flava robo, bruna vazo, verda pino, blanka cigno, griza ŝarko, ora suno); kaj por ĉiu el tiuj mi preparis grandan karton kun la nomo kaj kolora ilustraĵo.

Mi eksperimentis ankaŭ per versio en Esperanto de *Here We Go Round the Mulberry Bush*:

Musical score for 'Here We Go Round the Mulberry Bush'. It consists of one staff of music in 3/8 time, featuring a melody. The key signature has one sharp (F-sharp). The chords indicated below the notes are G, D7, and G.

Ĝi havis ok strofojn. La unua tekstis: “Ĉirkaŭ la arbo dancas ni, dancas ni, dancas ni. Ĉirkaŭ la arbo dancas ni en malvarma, frosta mateno.” Por la postaj sep strofoj mi uzis matenajn agojn, kiajn la infanoj povis mimi: “Tiel la manojn lavas ni”; “Tiel la dentojn brosas ni”; “Tiel la harojn kombas ni”; “Tiel la ŝuojn laĉas ni”; “Tiel la lakton trinkas ni”; “Tiel la gantojn portas ni”; ĝis “Al la lernejo iras ni”. Montrigis, tamen, ke kanto enhavanta tiom da variado estas iomete tro komplika por la plimulto de la klasanoj: eble ĝi pli taŭgas por infanoj de ses ĝis dek jaroj.

Nur unu kanteton mi mem tute verkis. Temis pri korpopartoj. La melodio estas simpla:

Musical score for 'Kanteto pri korpopartoj'. It consists of one staff of music in 4/4 time, featuring a melody. The key signature has one flat (B-flat). The chords indicated below the notes are F, C7, F, Bb, F, Bb, F, F, C7, F, Bb, G7, C7, F.

La unua strofo tekstis: “Mi havas unu kapon, jes, kapon, jes, kapon. Mi havas unu kapon. Jes, kapon havas mi.” Je ĉiu mencio de la kapo, kies unuan silabon oni aparte emfazis, la infanoj devis tuŝi sian kapon. Simile, “Mi havas du orelojn ... orelojn havas mi”; kaj “du okulojn”; kaj “unu nazon”; kaj “unu buŝon”; kaj “nur du manojn”; kaj “nur dek fingrojn”; kaj “du piedojn”; kaj “du genuojn”. Por ĉi tiu kanto mi preparis elmontreblajn kartojn, ĉiun kun teksto kaj ilustraĵo, kiujn eblis uzi ankaŭ aliokaze por instruado pri la nomoj de la korpopartoj.

La estrino de la antaŭlernejo sin demandis ĉu eblas interesigi la gepatrojn pri Esperanto pere de la infanoj. Laŭ ŝia propono mi verkis kelkpaĝan resumon pri la gramatiko, la prononco kaj tiel plu, kun ekzemploj de oftaj vortoj kaj esprimoj; kaj ĝin ŝi diskonis. Neniu poste petis plian informon, eĉ malpli lecionon. Tamen mi ja rimarkis, en la gazeto de Universitato de Novanglujo, reklamon pri “*parent-run, non-profit*” infanlernejo, sciigantan interalie, “*French, recorder and Esperanto taught*”.

Laŭ mia scio, neniu el la infanoj daŭrigis sian kontakton kun Esperanto, post kiam li aŭ ŝi progresis al elementa lernejo; kaj tian atingon mi ja ne atendis. Tamen mi kuraĝas esperi ke la plimulto da ili restos konantoj, eĉ se ne sciantoj, de la lingvo, kaj ke tial ili estos pli impresigemaj kiam ili renkontos tiajn influojn kiaj varbis nin nunajn Esperantistojn. Krome, mi devas konfesi ke mi mem profitis de la sperto: instruo ne malofte montriĝas la plej efika metodo lerni.

Dek rakontetoj por infanoj

Alano kaj la flava birdo

Estis post la lernejaj horoj. Alano piediris hejmen. Malantaŭ si li aŭdis pepon. Li turnis la kapon. Jen staris flava birdo. Ŝajnis ke ĝi sekvas lin.

“Saluton!” diris Alano. “Pep, pep!” diris la birdo.

Alano rekomencis piediri. La birdo sekvis lin. Li atingis sian hejmon. Li eniris tra la strata pordego. La birdo sekvis lin. “Pep, pep!” ĝi diris.

“Ĉu vi malsatas?” dins Alano. “Pep, pep!” diris la birdo. “Atendu!” diris Alano. Li eniris la domon. Li elvenis kun peco da pano. Li donis panerojn al la birdo. La birdo prenis ilin de lia mano. Alano havis novan amikon.

Virino kriis de la strato. “Hej!” ŝi kriis. Alano rigardis ŝin. “Jes?” li diris. “Tio estas mia birdo,” ŝi diris. “Kion vi faras kun ĝi?”

Alan diris, “Ĝi sekvis min. Ĝi ŝajnis malsata.” “Kompreneble!” diris la virino. “Ĝi ne havis sian tagmanĝon. Mi iris doni semojn al ĝi. Sed ĝi eskapis el la kago.”

“Ho!” diris Alano. “Mi pensis ke ĝi estos mia.”

La virino rigardis lin. “Ĉu vi zorgos pri ĝi?” ŝi demandis. “Ho, jes!” Alano diris. “Ĝi estas mia amiko.” “Nu, vi povas havi ĝin.” ŝi diris. “Venu preni la kaĝon!”

La virino kondukis lin al sia domo. La flava birdo refoje sekvis lin.

Alica kaj la letero

Alica iris preni sian poŝton. La skatolo staris apud la strato. En la skatolo estis kvin kovertoj. Ŝi portis ilin en la domon.

Ŝi malfermis koverton. Ŝi elprenis presitan leteron. La letero venis de ŝia banko. La banko volis prunti al ŝi

monon. Alica ne deziris pruntepreni monon. Ŝi ĵetis la leteron en la rubujon.

Ŝi malfermis duan koverton. Ŝi elprenis presitan leteron. La letero estis precize sama. Ŝi ĵetis ĝin en la rubujon.

Ŝi malfermis trian leteron. Ĝi estis sama kiel la aliaj du. Ŝi malfermis la kvaran kaj la kvinan. Ankaŭ ili estis samaj.

“Kia malŝparo de papero!” ŝi diris. Ŝi forĵetis la leterojn. Ŝi skribis leteron al la banko. “Sendu nur unu al mi!” ŝi skribis.

Post tri tagoj kvin leteroj venis. Ŝi malfermis unu el la kovertoj. La letero estis de la banko. Ĝi dankis Alican pro ŝia letero. Ĝi diris, “Nia komputilo eraris. Sed ni jam ĝustigis ĝin.”

Alica malfermis duan koverton. Ĝi enhavis identan leteron. Same la tria koverto. Same la kvara kaj la kvina.

Ŝi refoje skribis al la banko. “Sendu nenion al mi!” ŝi skribis.

Post tri tagoj — kio okazis?

La drako kaj la pomo

Iam estis drako. Ĝi loĝis en kaverno en monto. Iun tagon ĝi sentis sin malsata. Do ĝi iris al la urbeto.

En butikio ĝi vidis ruĝajn pomojn. Estis neniuj en la butikio.

La butikisto forestis ĉe kunveno. La kunvenintoj planis rostfeston. Por tio ili bezonis fajron. Sed ili ne havis alumeotojn.

La drako prenis pomon. Ĝuste tiam la butikisto revenis. Li postulis pagon por la pomo. Sed la drako ne havis monon.

La butikisto havis ideon. Li diris, “Ĉu vi povas fari fajron?” “Kompreneble!” respondis la drako.

“Bonege!” diris la butikisto. “Mi in-

vas vin al la rostfesto.” Kaj li donis al la drako du pomojn.

Izabela kaj Ŭuf

Izabela havis hundon. Ĝia nomo estis Ŭuf.

Iun matenon ili promenis en parko. Pigo plongatakis ilin. Ŭuf laŭte bojis. Ĝi ĉasis la pigon. Ŭuf ne vidis malfermitan drenfaŭkon. Ĝi falis enen. Izabela rigardis en la drenfaŭkon. Ŝi ne povis vidi Ŭufon.

Izabela komencis plori. Homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi. Iu proponis ke oni alvoku la policon. Alia preferis alvoki la fajrobrigadon. Ili disputis. Izabela ploris pli laŭte.

Subite ŝi aŭdis mallaŭtan “Ŭuf!” La sono venis de malantaŭ ŝi. Ŝi sin turnis, kaj vidis Ŭufon. Ĝia felo estis tre malseka.

Izabela diris, “Ŭuf, de kie vi venis?”

Viro montris al malsekaj piedspuroj. Izabela sekvis la spurojn. Ili kondukis al alia drenfaŭko. Izabela rigardis Ŭufon. Ŝi demandis, “Ĉu vi elvenis de tie?”

Ŭuf rigardis ŝin. Ĝi rapide skuis sian tutan korpon. Akvo ŝprucis el ĝia felo. Nun ankaŭ Izabela estis malseka.

Karlo kaj la biciklo

Iam estis knabo. Lia nomo estis Karlo. Karlo havis biciklon.

Li iris al la biblioteko. Li lasis la biciklon ekstere. Post horo li elvenis. La biciklo ne estis tie. Kio okazis?

Karlo vidis policanon. Li iris al la policano. Li diris, “Ĝu ŝtelis mian biciklon.”

La policano diris, “Mi scias.” “Kiel vi scias?” Karlo demandis. La policano ridetis. “Mi vidis la ŝtelon. Mi arestis la ŝteliston. Via biciklo estas ĉe la pollicejo.”

“Ho, dankon!” Karlo diris. Li iris preni la biciklon. Kun li iris la policano.

Tiu diris, “Mi havas konsilon por vi.” “Jes?” diris Karlo.

La policano diris, “Vi devus ŝlosi vian biciklon.” Karlo demandis, “Kiel?” “Per ĉeno kaj pendseruro.” “Tion mi faros,” diris Karlo.

Monika kaj la ekzameno

Monika studis ĉe la universitato. Post ekzameno ŝi iris ferii. Nun ŝi revenis. Taksio portis ŝin al ŝia hejmo.

Ŝi pensis pri la ekzameno. Ŝi deziris scii la rezulton. (Ĉu estis letero de la universitato?)

Ŝi iris al la letterskatolo. Ĝi kuŝis sur la tero. Najbarino aperis. Monika montris al la letterskatolo. Ŝi demandis, “Kio okazis?”

La najbarino parolis rapide. “La ambulanco faligis ĝin.”

Monika demandis, “Kiu ambulanco?” “Tiu, kiu forportis la policanon.” “Kiun policano?” “Tiu, kiun la krimulo vundis.” “Kiu krimulon?” “Tiu, kiu enrompis en vian domon.”

“Ho! Ĉu li ŝtelis ion?” “Ne! Li mortis.” “Ĉu la polico mortpafis lin?” “Ne! Li pereis en la fajro.” “Kiu fajro?” “Tiu, kiu detruis vian kuirejon.”

Monika preskaŭ svenis. “Ĉu io alia okazis?” ŝi demandis. La najbarino prezentis koverton. “Nu, mi konservis vian poŝtaĵon.”

Monika prenis la koverton. Ŝi malfermis ĝin. Ŝi eligis krion de ĝojo. “Mi sukcesis en la ekzameno!” Ŝi dancis ekscitite. Ŝi kriis, “Kia bela tago!”

Oskaro kaj la hundo

Oskaro ludis en parko. Li provis la balancilon. Li provis la toboganon. Sub arbo estis sablejo. Li tie konstruis

kastelon.

Subite li aŭdis bojadon. Hundo aperis kaj kuris al Oskaro. Oskaro timis. Li saltis supren por ekpreni arbobranĉon. Li grimpis sur la branĉon. La hundo staris sube kaj bojis.

La branĉo estis maldika. Ĝi komencis rompiĝi. Oskaro estis falonta.

Tiam aperis sinjorino. Ŝi etendis manon al Oskaro. Ŝi helpis lin veni malsupren. La hundo saltis al Oskaro. Ĝi komencis leki lian kruron. Oskaro tre timis.

La sinjorino diris, “Ne timu! Mia hundo estas amikema. Ĝi volas ludi kun vi.” Ŝi trovis pecon de ligno. Ŝi transdonis ĝin al Oskaro. “Ĵetu ĝin!” ŝi diris.

Oskaro ĵetis la lignopecon. La hundo bojis pro ĝojo. Ĝi kuris post la lignopeco. Ĝi portis ĝin al Oskaro. Ĝi lasis ĝin fali ĉe liaj piedoj. “Ĵetu ĝin refoje!” diris la sinjorino.

Oskaro ĵetis la lignopecon. La hundo kuris post ĝi. Ili ambaŭ ĝuis la ludadon.

Roberto kaj la glaciaĵo

Roberto piediris laŭ la strato. Li renkontis Anĝelan. “Saluton!” li diris.

Ŝi diris, “Kien vi iras?” Li respondis, “Al la loka butiko.” “Kial?” ŝi demandis. “Por aĉeti glaciaĵon,” li respondis.

Anĝela diris, “Mi ŝatas glaciaĵojn.” “Ankaŭ mi,” diris Roberto. Anĝela diris, “Ĉu vi aĉetos por mi?”

“Mi ne povas,” Roberto diris. “Kial ne?” demandis Anĝela. Roberto diris, “Mi havas nur dolaron.” “Ho!” diris Anĝela. “Tamen mi iros kun vi.”

Ili atingis la butikon. En la fenestro estis avizo. “Rigardu!” diris Anĝela.

Ŝi voĉlegis la avizon. “Hodiaŭ estas speciala oferto. Aĉetu unu glaciaĵon, kaj vi ricevos duan senpage.”

Ili eniris la butikon. Ili elvenis kun feliĉaj vizaĝoj. Ĉiu el ili havis glaciaĵon.

Suzana kaj la fantomo

Ekstere pluvis kaj pluvis. Forta vento blovis. Suzana sidis sur brakseĝo. Antaŭ ŝi brulis varma fajro. Ŝi legis libron. La libro temis pri fantomoj. Pro la varmeco ŝi iĝis dormema. Ŝiaj okuloj fermiĝis.

Estis frapetado sur la fenestro. Suzana rigardis en tiu direkto. Ekstere estis blanka figuro. Ĝi ŝvebis super la tero. Ĝi refoje frapetis. Ĝi kriis, “Malfermu la fenestron!”

Suzana obeis. La figuro glitis en la ĉambron. Ĝi etendis la manojn al la fajro. Ĝi diris, “Estas malvarme ekstere.”

Suzana rigardis ĝin. “Kiu vi estas?” ŝi demandis. “Mi estas fantomo,” la figuro respondis. “Mi serĉas sekan loĝejon.” Ĝi paŭzis, kaj levis blankan brakon. “Mi decidis ke mi loĝos ĉi tie.”

Suzana skuis la kapon. “Absolute ne!” ŝi diris. La fantomo demandis, “Kial ne?” Suzana direktis fingron al ĝi. “Vi estas fantomo,” ŝi diris. “Mi ne volas esti hantata.” La fantomo ridis. “Vi ne povas elpeli min,” ĝi diris.

“Ni vidos,” diris Suzana. Ŝi forte blovis al la fantomo. Ĝi estis blovita en la fajron. Ĝi malaperis laŭ la kamentubo.

Suzana eksidis sur la brakseĝo. Baldaŭ ŝiaj okuloj fermiĝis. Ŝi aŭdis frapetadon. Ŝi malfermis la okulojn. La vento skuis arbobranĉon. Ĝi frapetis kontraŭ la fenestro.

“Tiu sono vekis min,” ŝi diris. “Kian strangan sonĝon mi havis!” La libro kuŝis sur ŝiaj genuoj. Ŝi rekomencis legi pri fantomoj.

Vilhelmo kaj la dometo

Vilhelmo staris ĉe la fenestro. Li mie-

nis malgaje. Pluvis senĉese. Li ne povis ludi ekstere. Kion li povis fari? Li gratis al si la kapon.

Subite li havis ideon. “Mi konstruos dometon,” li diris. Li iris preni la ludoblokojn. Li disĵetis ilin sur la planko.

Li konstruis la frontan muron. En ĝi li lasis truon por pordo. Li konstruis la flankajn murojn. En ili estis truoj por fenestroj. Li konstruis la malantaŭan muron. En ĝi estis neniu truo.

En ŝranko li trovis kartonon. El ĝi li faris tegmenton. Li surmetis la tegmenton. Li staris, rigardante la domon. “Io mankas,” li diris. “Dometo bezonas kamentubon.” Li konstruis kamentubon.

“Estas bona dometo,” li dins. Sed li mienis malgaje. “Neniu loĝas en ĝi,” li diris.

Li aŭdis etan voĉon malantaŭ si. La voĉo diris, “Pardonu min!” Vilhelmo turnis la kapon. Tie staris eta koboldo.

Ĝi diris, “Kia bela dometo! Ĉu mi povas loĝi en ĝi?”

“Kompreneble!” Vilhelmo diris. “Ho, dankon” diris la koboldo. Ĝi eniris tra la porda truo. Post minuto ĝi elvenis. “Ne taŭgas,” ĝi diris. “Dometo bezonas pardonon.”

“Momenton!” diris Vilhelmo. Li iris al la ŝranko. Li revenis kun pli da kartono. El ĝi li faris pardonon. Li instalas la pardonon.

La koboldo diris, “Dankon!” Ĝi provis la pardonon kaj eniris. “Bonan nokton!” ĝi diris. □



Kiel oni nomas tiun, kiu parolas tri

lingvojn? — Trilingvulo!

Du lingvojn? — Dulingvulo!

Unu lingvon? — ... usonano...!

[El *Eventoj*]

Nia Konkurso

La Konkursaĵoj

La tasko estis fari kiel eble plej multajn vortojn el la litero *s ĝ e r i u o t k*. En unu vorto, neniu litero rajtis esti uzata pli ol unufoje. Ĉiu vorto devis enhavi la literon *i*. Ĉiu vorto devis esti kompleta (ne nur nuda radikoj). Devis esti almenaŭ unu naŭlitera vorto.

Por la konkurso ni ricevis kvin kontribuojn:

Venkis en la konkurso Kay Andersen kaj ŝia konversacigrupo per ĉi tiu listo de 79 vortoj:

Ekiras, eriko, eskorti, esti, estri, etiko, ĝi, ĝiro, ĝis, ĝuis, ĝuste, ile, ies, iĝos, ikso, iktero, io, iu, iro, kie, kies, kio, kiu, kiso, kosti, kreto, kreito, kruti, Kristo, kriuo, krustiĝo, kurio, kuristo, korusi, koti, krio, kuiru, ori, reĝis, rektiĝu, resti, risiko, rito, rukti, rosti, rustiĝo, rustiko, serio, si, sieĝo, siko, sito, sketi, streki, skio, skui, stoiĝe, sterki, stiru, stoki, strio, striko, sukero, sukuri, stiro, tie, tiu, ties, tio, tiru, tri, triku, turkiso, tusi, truki, urĝi, urio, urtiko

9-litera vorto: ektruiĝos

Marcel Leereveld sendis 69 vortojn:

ekio, ekiro, ekxi, ekstri, eriko, erotiku, eskorti, esti, estri, etiko, ĝi, ĝiro, ĝis, ĝui, ĝusti, ie, ies, ikso, iktero, ikto, io, isto, iu, kreti, Kriste, kriuo, kuire, kuri, oki, ori, orti, osti, rekti, resti, reĝi, riske, rito, ruki, rusti, ruĝi, seki, serio, si, skio, skui, skurgi, skuti, sterki, stoki, striko, strio, sukero, sukuri, suri, tire, tri, trikseĝo, troi, truki, turi, Turkio, turkiso, tusi, urio, ursi, urtiko, urĝi

9-litera vorto: restukiĝo

De Vera Payne venis 52 vortoj. (Mi konservis ŝiajn komentojn kaj dubojn):

eki, eriko, erotiku (! sen um?) esti, estri, etiko, ĝi, ĝiro, ĝis, ĝui, ie, io, iu, iĝu, ikso, iru, kiso, kisto, korusi, kosti, kuire, kuri, resti, rito, risiko, rosti, rukti, rusti, ruti (! to do a Ruth!), serio, sieĝo, siroke!, skui, stire, striku, strio, teksu, teoriu (sen um?), tire, tri, triku, truki, trusi?, turkiso, tusi, urĝi, urio, urtiko

Ŝi proponis kiel 9-literajn vortojn elekton el:

kiseturĝo, kisurĝeto, urĝetkiso, aŭ urĝkiseti!

Rilate al la demandoj/duboj: Ŝajnas al mi

ke *erotiku, ruti, teoriu, trusi* estas tute akcepteblaj vortoj, kaj al mi tre plaĉas la vorto *siroke*.

Jenifer Jefferies sendis 35 vortojn:

ĝiro, ĝis, ĝui, esti, estri, etiko, kie, kio, kiu, krei, kristo, kuri, resti, reti, risiko, rito, rosti, rukti, serio, suri, skio, skui, skurgi, sterki, stoiĝe, streki, strio, striko, stuki, tri, tre, trui, ektusi, urĝi

Kaj kiel naŭliteran vorton: ekrestigi

Jennifer ankaŭ sendis plurajn vortojn kiuj estas malakceptitaj pro malkonformo al la reguloj (en ili mankis la litero *i*; kaj *tri/trio* enhavas saman radikojn).

Gwenda Sutton sendis 23 vortojn:

ekiru, ĝiro, ĝis, ĝuis, kies, kisto, koitus, kostis, krio, krutigos, kurio, sekigos, serio, striko, strio, skuis, tineo, tino, tinuso, tiru, triku, trio,

kaj kiel 9-literan vorton: Ekstroigis

Vera Payne opiniis ke la korelativaj vortoj enhavas po du radikojn, do nur *ie, io, iu* (kaj, kvankam ŝi ĝin forgesis, *ies*) estas uzablaj, sed ne *kie, kio, (kies), kiu*. Tamen en la *Fundamento* ili listiĝis kiel apartaj vortoj, kaj estas oficiale konsiderataj tiaj. Ĉiukaze, ilia en- aŭ eksterlasigo ne grave influas la rezulton.

La venkinto ricevis kiel premion ekzempleron de Lewis Carroll: *Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie* (eld. Sezonoj 2001). □

NZEA Kongreso en 2003

La NZEA Kongreso 2003 okazos en Christchurch, Nov-Zelando, dum la kvar tagoj 18 Aprilo - 21 Aprilo 2003. La kongresejo estos en la "Arts Centre" — historiaj konstruaĵoj proksime al la centro de Christchurch. Ŝi povas trovi kelkajn hotelojn kaj loĝejojn ne tre for, sed ni sugestas la YMCA-n kiu havas ĉambrojn kontraŭ malalte prezo kaj troviĝas preskaŭ apud la kongresejo.

En tiu parto de Christchurch vi povas facile viziti la muzeon, la botanikajn ĝardenojn kaj aliajn vidindaĵojn

Enketoj al Nov-Zelanda Esperanto Asocio, aŭ al la sekretario de la LKK, David Dewar, 4 Harlech Mews, Avonhead, Christchurch 8002, NZ. □

Ret-eldono de *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary*

raportas Donald Rogers

Dum la lasta jaro, laŭ interkonsento kun la redaktoroj, Brian Fox kaj Ralph Harry, mi entreprenis la enretigon de la vortaro *Australian and New Zealand Esperanto Dictionary*. En februaro ĉi-jare mi finis la unuan stadion kaj enretigis ĝin ĉe:

www.geocities.com/esperanto-nz/anzed/anzed.html

Tiam mi sciigis la redaktorojn por ke ili havu oportunon vidi ĝin. Nun mi invitas aliajn membrojn de AEA kaj NZEA rigardi ĝin kaj kunlabori pri la dua stadio. Pli pri tio sube.

Ŝanĝoj por enretigo

Por enretigi ĝin mi faris diversajn ŝanĝojn. La celoj de la ŝanĝoj kiujn mi faris al la teksto estis:

1. konservi la tradukaĵojn kaj difinonj eldonitajn en la 4a eldono;

2. aldoni hiperligojn inter rilataj terminoj; (hiperligo estas vort[grupo] kie oni povas alklaki per muso por salti al alia loko en la sama aŭ alia dokumento).

3. elimini ripetojn de la samaj difinoj (ekzemple ĉe *silvereye* kaj *waxeye*);

4. aldoni indeksojn de la esperantaj tradukaĵoj kaj biologiaj terminoj uzitaj;

5. eble aldoni indeksojn de ĉiuj fakoj (*ani*, *arb*, *ark*, ktp);

6. aldoni bildojn al taŭgaj artikoloj;

7. aldoni enciklopedian informon pri kelkaj terminoj (ekemple pri "hurricane") en apartaj ligitaj dosieroj;

8. aldoni hiperligojn al aliaj utilaj informoj en TTT (ekzemple ĉe *kiwi*).

Por atingi tiujn celojn mi devis iomete ŝanĝi:

1. kie la vortspeco estas evidenta de la esperanta tradukaĵo, ellasi el kapvortoj oftajn vortetojn (ekzemple "the", "a", kaj "to"). Tio evitas misan ordigon en la aŭtomata ordigado de indeksoj. (La simpla aŭtomata ordigado ne povas ignori tiajn vortetojn.)

2. forigi artikolojn kie la kapvorto estis latina nomo. Tio evitas ripetojn de difinoj ktp.

3. rearanĝi kelkajn artikolojn por grupigi rilatajn terminojn (vidu ekzemple "eucalypt") kaj iliajn hiperligojn.

Teknika laboro:

La teknika laboro estis: decidi pri taŭga strukturo por la vortaro utiligante la etendeblan markolingvon XML; redakti la dosieron kiun oni uzis por la papera versio, por konverti ĝin en la formaton XML; verki stilfoliojn (stilfolio estas speco de programo) por montri la vortaron en komputila ekrano (en formato HTML). Estonte mi verkos stilfoliojn taŭgajn por presita formo. Tio estos en pli kompakta formato ol sur la ekrano, simila al tia de la kvara eldono de la papera versio.

La rezulto estas ke la vortaro estas rigardebla en la reto per diversaj specoj de retlegilo (Internet Explorer, Netscape, Opera, Mozilla, OmniWeb, k.a.); kaj estonte la tuto estos presebla en taŭga presformato.

Invito al kunlaborado

Ni ankoraŭ bezonas:

1. pliajn ĝigitajn kolorajn bildojn por ilustrii diversajn artikolojn (precipe plantojn, bestojn ktp). La grandeco povas esti ĝis maksimume 320 x 240 bilderoj (aŭ proksimume 100 x 75 mm) sed prefere pli malgrandaj, se sufiĉe klaraj;

2. pli da redaktado, por plibonigi la uzeblecojn.

Mi metis la retan version en la retejon de NZEA kaj nun invitas helpon pri la kolektado de ĝigitaj bildoj (ne kopirajtaj). Sendu ili al Brian Fox brianandjackie@abztrak.co.nz aŭ al mi rogers@ihug.co.nz. Utiligu la vortaron por via tradukado kaj informu nin pri viaj spertoj. □

For the Beginner

Words of the month:

mastruma sistemo

kongrua

These are computer words which in English translate as “operating system” and “compatible”. A computer is really just a collection of electronic parts assembled in a large plastic box. By itself it can do nothing. An “operating system” is a very complex arrangement of electrical paths which make the electronic components do something. Until the 1980s computers mostly did simple arithmetic — addition and subtraction — though at enormous speeds. In the early 1980’s various methods of making the electronic components do other things were being tried, along with various methods of seeing the results. A modern computer essentially consists of a box of electronic components, a method of storing the electric path details, a TV screen for seeing the results, and a keyboard for directing what is to be done.

Until about ten years ago each computer manufacturer had their own selection of electronic components and their own system for making their computers work. In the mid 1980s IBM and Apple Computer developed set-ups and systems that gradually came to dominate the market. IBM’s system for making their computers work was named DOS, which it leased from Microsoft Corporation, and Apple Computer’s system was one they developed themselves.

An “IBM compatible” computer (*IBM-kongrua komputilo*) is one which can use one or more of Microsoft’s systems, of which there are several. Besides DOS there are the “Windows” systems, among which Windows 95 and 98 are developments of one system, while Windows 2000 and Windows NT are another. These systems use a variety of electronic components and methods, though care has been taken to keep the screen appearance and keyboard usage of these very different systems similar. The name “Windows” has come to be called *Vindoza* in Esperanto.

Apple Computer is best known for its series of Macintosh computers¹ which originally used different components than those used by IBM. Apple’s system for making the components work was very different from Microsoft’s. The Macintosh systems have been named OS 1, 2, 3, etc., up to 9. A year ago Apple Computer introduced a totally different system which it named OS X.² OS X is a combination of the Unix system with a screen appearance and keyboard usage similar to that of Apple’s systems OS 1 through 9.

Unix is an operating system independent of any specific company, developed over the past 20 years by the free collaboration of many individuals. Until it was

1. McIntosh is a popular variety of apple in America, thus the choice of name.

2. X is the Roman numeral for 10.

adopted by Apple Computer, it was mostly used for the Internet rather than home or business uses, and Unix is still the system of choice for running computers used to operate the Internet.

Esperanto Style

From the start, Esperanto was intended to be used by persons from a very large number of language backgrounds. Although in theory Esperanto can accommodate styles used in most languages (word order, verb forms, grammatical customs, choice of words), a basic Esperanto style of language usage was developed from the start, and good Esperanto writing or speaking keeps to these principles.

For this reason, new students find it necessary to ignore much of what they have been taught is “proper” usage in English, when using Esperanto. Word-for-word translation from English into Esperanto (or any other language) does not give acceptable results.

In English we use -ing words very frequently, and in ways largely unfamiliar to users of other languages. In English we usually use them to say that we are doing something, for example: “I am -ing” is a very common and normal English way of speaking: *I am coming. She is eating an apple. He was reading a book. Who will be speaking at the meeting? Would you be wanting to take a train or an airplane?*

In Esperanto in these and almost all similar cases “simple” forms are used: *Mi venas. Ŝi manĝas pomon. Li legis libron. Kiu prelegos en la kunveno? Ĉu vi preferus uzi trajnon aŭ aviadilon?* Any attempt to reproduce the English expressions precisely results in very unusual and usually very bad Esperanto style. *Mi estas venanta. Ŝi estas manĝanta pomon. Li estis leganta libron. Kiu estos preleganta en la kunveno? Ĉu vi estus preferanta trajnon aŭ aviadilon?* may look to an English speaker as if they would be acceptable sentences, but in reality they are not good Esperanto except in some special circumstances.¹

In Esperanto words that end in *-ant-* normally are descriptive words, for instance *doloranta fingro* (a painful finger); *ploranta infano* (a tearful child); *ĉevalo kuranta en la kvina konkurso* (a horse running in the fifth race); *fluganta telero* (a flying saucer).

“*-ant-*” words are especially useful with a final *-o*: *Mi estas la gvidanto ĉi tie* (I am the guide here); *Bone konata skulptaĵo farita de Rodin estas “La Pensanto”* A famous sculpture made by Rodin is “The Thinker”; *Rusio sendas observantojn al kunvenoj de NATO* (Russia sends observers to meetings of NATO); *Arthur Conan Doyal estis la verkanto de la rakontoj pri Sherlock Holmes* (Arthur Conan Doyle was the writer of the Sherlock Holmes stories). [dE]

1. Generally speaking, they are used only for special emphasis of one sort or another.

Auxiliary Verbs

by Marcel Leereveld

Compare the following two sets of phrases:

- A.1. Ni ludis kaj interbabilis dum la vespero.
 2. Ni trinkis sed ne manĝis dum la vespero.
 3. Ni deziris vinon kaj proponis trinkmonon

- B 1. Ni deziris proponi trinkmonon
 2. Ni proponis pagi kontante.
 3. Ni volis aĉeti vinon.
 4. Ni povis pagi kontante.

Under A. we add two actions, and neither needs to mix with the other. In A.1. the playing and the talking can take place without depending on one another. In A.2. we simply add two actions, the drinking and the not-eating, not influencing one another. In A.3. we again simply put two actions next to each other, the drinking wine and the offering of a tip. The actions are separate, and not necessarily happening at the same time.

Under B. there are again two actions, but one influences the other: they mix and one “helps” the other. In B.1. our action is not just offering a tip, but *wishing to offer* that tip. In B.2. we did not just pay but we *offered to pay*; two actions intertwined, the offering and the paying. In B.3. we did not only *buy* but bought *willingly, wanted to buy* the wine, the wanting and the buying going together. In B.4. we not only *were able to do something* but *were able to do the paying*. In all the sentences under B. the first verb (with -as, -is, -os, -u, or -us) **helps** the second verb, which then in Esperanto always ends in -i (= infinitive). The first verb, helping the second one, could be called an “auxiliary” verb (= helpverbo).

Most of these help-verbs can also be used with a direct object, not helping another verb:

Li deziris manĝi [verb + infinitive]

Li deziris kukon [verb + direct object]

They are therefore not officially called “auxiliary verbs” (helpverboj), but are ordinary verbs sometimes *acting as* help-verbs. There are many of these verbs: Li *instruis konduki* aŭton; Mi *ŝatos rigardi* la televidon; Ŝi *vidis* lin *ŝteli*.

Note 1: Sometimes the Direct Object belongs to the Help-Verb and sometimes to the MainVerb (and even with two Objects: Ŝi vidis lin ŝteli juvelon)

Note 2: There may be more than one Help-Verb, in which case only the first one receives the ending -as, etc. and the next ones the ending -i: Vi povos komenci ŝati ludi ŝakon (ati defines ludi, komenci defines ŝati ludi, and povas defines komenci ŝati ludi).

Some special advanced points

There are some action-words which can never be used otherwise than as auxiliary verbs, and therefore are classed as such (modaj helpverboj, “modal auxili-

iaj” verbs). This means they are normally never followed by a direct object, only by another infinitive verb. They are:

povi = can, to be able to: Ne zorgu, vi *povas manĝi* baldaŭ.

devi = must, to have to: Ci ŝvitis, ci *devos bani* cin.

kuraĝi = to dare: Ĉu vi *kuraĝis transsalti* la kanaleton?

kapabli = to be capable of: La infaneto jam *kapablas piediri*.

peni = to try: Kaj nun *penu enmemorigi* la poemon.

rajti = may, to be allowed to: Ŝi havis *kondukpermesilon*, do ŝi *rajtis aŭtomobili*.

Note 3. These Modal Auxiliaries, Modaj Helpverboj, are always followed by an infinitive, can never be used on their own (except in repetitions where the infinitive is understood: “Cu ci povas naĝi —Jes, mi povas (naĝi)”, and usually can not have an Object. If they seemingly have, the Object belongs to an Infinitive understood: Ili kapablas (fari) tion. It is better, though, not to leave out the main verb with these auxiliaries, and say: Ili kapablas fari tion; Mi povis veni; Li devis fari tion; Ci rajtos fari tion, and Ŝi penos fari la montgrimpon.

Note 4: According to some Esperantologists (Waringhien, Kalocsay, et.al.) both the action of the modal auxiliary and the action of the main verb have happened (in the past tense) or will happen (in the future). In other words, if I say “Mi povis preni parton en la Somerkursaro” this means not only that I had the ability to take part, but also that I really took part. This is not the case with those combinations where the auxiliary verb is only occasionally used as such; compare “Mi volis doni donacon”, where in effect I gave a present, with “Mi deziris doni donacon”, where I only wished to give a present, but not necessarily did.

Note 5: It is, of course, possible to use other grammatical forms of these verb stems. For example:

(Infinitive): *Voli estas povi*.

(Noun): *Tio estas lia devo*.

(Adjective): *Ŝia estas kuraĝa decido*.

(Adverb): *Li pene eskapis*.

Note 6: In theory it is allowed to combine the modal auxiliary and the main verb to make a single verb: Ili *manĝopovis* nur unu fojon tage. This is, however, rarely done, probably because it is not allowed with the other, “occasional”, help-verbs. For example, “*manĝdeziras*” must be “Mi *deziras manĝi*”.

Note 7: Because the “modal auxiliaries” have no Object, they are intransitive and can never have a Passive form. With the “occasional” help-verbs it is different: they are generally transitive and their main verb (infinitive) is often a Direct Object: “Ŝi proponis retroiri hejmen → *Retroiri hejmen proponatis de ŝi*.”

In English we have also verbs which are often used as auxiliary verbs to indicate grammatical aspects, such as time (tense), passive, etc.: We have come; They are eating; He was jailed; She does love him; Do you like sauerkraut? This type of auxiliary verb does not exist in Esperanto.

We **cannot** say “Ni havas veni”; nor “Ili estas manĝi” or “Ili estas manĝanti”;

nor *Li estis enkarcerigati” or “Li estis enkarcerigi”; nor “Ŝi faras ami lin”; nor “Ĉu faras ci ŝati acidbrasikaĵon?”

Instead in Esperanto we use simple verbs with special endings; or an added adverb; or the verb “esti”, which has several uses:

Sometimes it more or less means “to exist”, as in “Li estas en la ĝardeno”.

Other times is also used as a so called “copula” (kopulo) and means, more or less, “equals”: Ŝi estas instruisto; Ĝi estas flava.

And other times it may be used with an adjective or noun in place of a simple verb: Ni *venis* (or *estas venintaj*); Ili *manĝas* (or *estas manĝantaj*); Li *enkarcerigatis* (or *Oni enkarcerigis lin*); Ŝi vere *amas* lin; ĉu ci *ŝatas* acidbrasikaĵon?



Perdita en spaco

de Terry Manley



Malgraŭ avertoj al mia malnova amiko, LC 630, ĝi tiom tentiĝis per la brilluma, rapidega mondo de la TTT ke ĝi ne povis rezisti konekton. Mi ja diris al ĝi ke ĝi estas eksmodega 8-jaraĝa komputilo (en homaj jaroj tio proksimume egalas 1 030 041 jarojn), sed ĝi ne atentis min. Surf-umante kvazaŭ juna gigabajtulo ĝi fuŝfalis de paĝo al paĝo, malatentante la avertonotojn “Eraro 167”, “Eraro 234”, “vi devas havigi al vi ĝismodan softvaron por veni ĉi tien!”. Ĝi ne volis agnoski ke ĝi fakte ne kapablas havi pli novan softvaron pro siaj limigitaj sistemo kaj memoro. Kia malfero!

Aĉhĥhĥ.....Ĝi falis en abismon profundegan. Mi skuis ĝin. Mi reskuis ĝin. Nenia respondo. Ĉu ĝi mortis? Ho ne, fine la ekrano relumiĝis, fenestroj vidiĝis. Sed ne ĉiuj. Kie estas mia laboro de la pasintaj horo kaj duono? “Mi ne memoras” ĝi signis al mi. Do post reskuo el la abismo ĝi memoris nenion. Laboro perdita en spaco.

Kelkfoje nun ĝi rifuzas ekfunkcii. Ĉu pro paneo aŭ granda honto mi ne scias, sed se la gazeto malfruiĝos iam, vi scios la kialon.

[Ek *Telopeo* junio 2002]



POR RIDIGI VIN



Elefanto hazarde iras al naturista plaĝo. Li iradas tien kaj reen kaj atente rigardegas la homojn, kiujn ĝis nun ĝi vidis nur en vestaĵoj. Tiel promeneante li haltas ĉe grandstatura

muskola viro kaj diras:

“Sinjoro, pardonu min, sed min turmentas scivolemo, ĉu vi permesas ke mi demandu ion de vi?”

La viro surpriziĝas, tamen li donas la permeson.

“Diru, Sinjoro: Ĉu vi povas spiri sufiĉe profunde tra tiu etaĵo?”

[El *Naturista vivo*, numero 66, 2002]



POR RIDIGI VIN



Ĉu proverba dialogo?

Servato: Bonvolu, Kelnero, mi soifas!

Kelnero [Al la ĉeestantoj]: Jen nia proverbemulo. Ŝajne lia proverbaro ne elĉerpiĝas. Ni provu... [Al la Servato]: Sinjoro, vi bone konas nian devizon: sen mono oni estas nulo, kun mono saĝulo. Do, kia vi estas?

S: Nuda kaj kruda sen groŝo en poŝo.

K: Kiel mi suspektis... Sciu, tamen, sinjoro, ke por ĉiu plezuro devas esti mezuro. Kaj jen vi nun: malriĉa kiel muso preĝeja!

S: Ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via. Mizero faras viziton, ne atendante inviton...

K: Ne gutas mielo el la ĉielo. Cetere, kiu tro ripozas, baldaŭ almozas.

S: Via parolo por mi estas volapukajo. Al ĉiu birdo plaĉas ĝia nesto, kiel al mi ĉi aĉa kunvenejo.

K: Ĉiu havas sian guston... Sed, griza barbo saĝon ne atestas.

S: Kelnero... Vi estas mia amiko! Kiomfoje de mi vi komplezojn petis!

K: Nu, nu... Ne ekzistas fumo sen brulo... Bonvolu ne forgesi: amikeco aparte, ofico aparte.

S: Bono farita ne estas perdita. Cete-

re, imagu ke post mia forpaso tiu stala kunvenejo pli famiĝos...

K: Ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj... Antaŭ mortigo de urso, ne vendu ĝian felon!

S: Kiu ne riskas, tiu ne gajnas...

K: Mi ja konfesas ke tiu loko sen via ĉeesto ne estas kompleta. [Servante lin]: Tiel estas, tiel restas. Ĉiutage **unu** plia glaso for...

S: Nur tiom!? Ne estu malavara!

K: Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras... Cetere, se la kaliko pleniĝas, la vino elversigas.

S: Se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron!

K: Estimata ebrulo, senlanigu sed ne senfeligu. Krome, kiu ĉasas du leporojn kaptas nenium.

S: Kion vi perdis, tion ne serĉu...

K: Bone, sed ne atendu ke la okazo revenos al via nazo.

S: Vi estas bonkora, Joĉjo. Sed atentu ke via dekstra mano ne sciu kion faras la maldekstra. Iru labori, Joĉjo. Ankaŭ la aliaj soifas. Tamen konsilu ilin ne troigi.

K: Kia sensencaĵo! Sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras... Mi lavas al mi la manojn. [Sin direktas al alia tablo.]

[El *La Lampiro* jan.-aprilo 2002] □

Survoje al Kanbero

de Franciska Toubale

Pasko estas la ekscitanta tempo kiam mi ne plu bezonas cerbumi pri la akuzativo. Kune kun kelkaj aliaj esperantistoj mi ĉeestas la kanberan jaran naciajn festivalon pri popolarto. Dum kvin tagoj eblas sin mergi en la diversaj kulturoj de la tuta mondo, kant-

ante laŭ novaj melodioj, dancante je novaj ritmoj; muziko estas tiam nia Esperanto.

Mi restis unu tagon pli por viziti ankaŭ la botanikan ĝardenon. La tradukado de ties gvidlibro instigis min konatiĝi kun la neoftaj aŭstraliaj



Irine Czitronyi kaj Franciska Toubale

plantoj.

Sed ĉijare mi ricevis ankaŭ komision: Jenny petis min iri al Gundegai por alporti al Melburno librojn donacitajn de maljuna esperantistino.

Irene Czitronyi estas unu el tiuj esperantistoj kiujn mistrasfas ĉiuj statistikoj. Kvankam ŝi ĉiam konis la ekziston de la universala lingvo, tiu naŭdekjarulino esperantiĝis kiam ŝi aĝis sepdek. Ŝia granda familio kun ses infanoj verŝajne ne lasis al ŝi sufiĉe da libera tempo por sekvi sian emon. Ŝi sole lernis per libroj. Tio estis facila tasko por persono kiu jam konas la hungaran, la germanan, la francan, la latinan... Ŝi ne renkontis esperantistojn, krom okaze de kongreso en Kanbero en 1984, kaj pro tio ŝi ne flue parolas la lingvon. Ŝi uzas ĝin skribe. Ŝia unua korespondanto loĝis en Portugalio, sed per Esperanto ŝi kreis rilatojn ĉefe kun Ĉinio. Irene havas malfacilaĵojn nur por moviĝi, tamen ŝia menso daŭre viglas kaj rapide funkcias. Se longa veturado al Melburno ne atendus min, mi certe restus pli longe por aŭdi la rakontojn de tiu ĉarma esperantistino kaj de ŝia edzo.

Ankoraŭfoje Esperanto ardigis la sunon de niaj koroj. □

19a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto

5/01-17/01/03 en Melburno

La broŝuro dissendata kun ĉi tiu numero de *ĜPK* nun legeblas ankaŭ ĉe www.Esperanto.org.au. Kompreneble ne eblas detaligi en la broŝuro ĉiun programeron, el kiuj multaj ankoraŭ planatas. Tial mi penas nun akriĝi la deziron partopreni per kelkaj specialaj allogaĵoj.

Konfirmeblas ke ĉijare ni profitas la spertojn de ne nur kvar, sed kvin profesiaj instruistoj, el kiuj ne nur unu sed du estas eksterlandaj: Atilio Orellana Rojas el Argentino, nun loĝanta en Nederlando, Cseh-instruisto, jam tre konata kaj ŝatata membro de la teamo; kaj Grazina Opulskiene el Litovio, diplomita kaj brila instruistino ankaŭ laŭ la rekta Cseh-metodo. Pro ĉi tiu riĉaĵo eblas proponi je la 3a nivelo du klasojn, unu kiu koncentriĝos pri konversacio kaj gramatiko, la dua pri konversacio kaj literaturo. Tiel ĉiu povos elekti laŭ siaj personaj prefero kaj intenco.

Ankaŭ ĉijare la veraj komencantoj ricevos apartan atenton per plia leciono en la posttagmezo, sed restos ankaŭ sufiĉa tempo por aliĝi al unu aŭ du el la tre diversaj proponitaj “okupiĝoj” aŭ por daŭrigi onian studadon per individua helpo. Sinmergado, kun ties bona efiko, okazos preskaŭ senkonscie!

Kvankam proponatas preparado por la Baza kaj Meza ekzamenoj de la Aŭstralia studplano, tempo por distriĝi ne mankas. Organizatas tuttaga ekskurso al Ballarat, la fama kaj bela orurbo de Viktorio, kaj al la antikva urbeteto Sovereign Hill, kie oni ŝajnigas la vivon de la 19a jarcento. Poste, duontage, per pramboato vi povos konatiĝi pli kun la rivero Yarra kaj kun la haveno de Melburno survoje al beleta velboathaveno, Williamstown


Kaj vespere vi ne enuos ĉar, krom la grava ĝenerala Jarkunveno de AEA, programo de ludoj, ilustritaj paroladoj kaj dancado jam atendas, kaj ne forgesu la spektaklojn prezentotajn en la drama kaj muzika konkursoj.

Jennifer Bishop, Kunordiganto. ☎ /
☎: 9818 7358 (escepte de dum aŭgusto)

Nova “klerulo”: Ron Gates

de Marcel Leereveld

Sukcesis en la *Klereca Ekzameno* profesoro Ronald Gates de Armidale NSW.



Kvankam ĉiu aŭstralia esperantisto estas samvalora, valorega, por Esperanto, ni estas tre bonŝancaj havi profesoron Gates inter ni. Li estas konata kiel multkrea novelisto esperanta, precipe pri krimnoveloj. Lia stilo estas malpeza kaj precize pri-skribema, uzanta malmulte da mal-

simplaj kaj neologismaj vortoj. Oni eble ne scias ke li krome estas unu el la plej kleraj, se ne la plej klera, esperantologo en Aŭstralio, ne timanta uzi nekutimajn formojn se tiuj estas gramatike pli ĝustaj ol la konvenciaj. Espereble tiu freŝa vento helpos plimodernigi la tro neologismeman kaj tro neprofesian staton lingvisman de Esperanto nuntempe.

Profesoro Gates estis ankaŭ strikta kaj multlabora, kvankam modestema, prezidanto de AEA. Ni perdis lin kiel tian, konsciante ke tiel li povos doni pli al la lingva disvolviĝo en nia lando.

Nur manpleno da aŭstraliaj esperantistoj posedas la *Klerecan* diplomon, kaj ni kore gratulas Ronaldon pri lia sukceso. Ke lia ekzemplo kuraĝigos aliajn prepari sin por unu el la ses ekzamenoj haveblaj en Aŭstralio esperas ni ĉiuj. □



Skribas la Legantoj



Skribis Donald Rogers:

Mi sentas devon atentigi legantojn al la uzo de “falsa amiko” en la artikolo de Marcel Leereveld. La vorto “adjunkto” estas “helpanta oficisto” (PV kaj PIV). La esperanta vorto por la angla “adjunct”, en la senco kiun Marcel intencis estas “adjekto”¹ — “vortfunk-

cio esprimanta unu el la cirkonstancoj inter kiuj fariĝas la ago aŭ stato de la subjekto = cirkonstanca komplemento)” (PIV kaj PAG). La vorto “adjekto” ofte uzatas en verkoj pri gramatiko.

Pri la ekzemplo “Mia frato riparas la aŭton jaŭdon”, estas konsilinde ne uzi du akuzativajn komplementojn en la sama simpla frazo. Evitu tion ekzemple per “Mia frato riparas la

1. Efektive, kulpas pri ĉi tio ne Marcel sed via redaktoro, kiu miskopiis la manuskripton. Mi pardonpetas al Marcel. — (db)

aŭton je jaŭdo”.

Pri verboj kiaj “iri, dormi, sidi”. Marcel informas ke ne eblas pasivigi ilin. Tamen oni trovas ekzemplojn, kiaj “multe irata strato”. Zamenhof klarigis ke: “eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas...libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu pasivo estos komprenebla” (PAG §119 B).

Multaj gramatikaj klarigoj pri Esperanto estas tro simpligitaj kaj traktas “irata, dormita, loĝata” ktp kiel esceptojn. Ofte oni diras ke mankas esceptoj en Esperanto, do la defio estas priskribi la gramatikon per konsekvenca modelo

Esplorinte la gramatikon de diversaj lingvoj, Hopper kaj Thompson (“Transitivity in Grammar and Discourse”, *Language* 56: 251-299, 1980) asertis ke la nocio de transitiveco ne karakteriziĝas kiel ĉiom-aŭ-neniom, kaj ke la ĉeesto de objekto en frazparto ne necese montras fortan transitiveton de tiu frazo. Ili mezuris la transitiveton de frazo laŭ la efikeco aŭ intenseco per kiu la ago transiras de unu partoprenanto al alia. Eĉ malforte transitiva verbo (ekzemple “iri, dormi, sidi, loĝi”) povas havi pasivon. Kopuloj kaj medialoj ne povas havi pasivon. La problemo estas klarigi la reston. □



El la Regionoj



NSK: Dum la pasintaj semajnoj venis multaj vizitantoj al Esperanto-Domo. Jeremy Bass, kanadano, estis la unua. Sekvis Rainer Kurz, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio; kaj Vladka, ĉeĥo kiu dum la venonta jaro studos la anglan lingvon en Sidnejo. Spertulino pri Esperanto, ŝi esperas ĉeesti la venontan Somerkursaron kiel instruisto.

Ankaŭ el Kanado venis Richard kaj Martha Moir, kiuj loĝis en Sidnejo antaŭ preskaŭ 30 jaroj. Fluginte orienten de Kanado, ili vizitis kelkajn landojn, inkluzive de Hindio, kie ili aĉetis sitaron. Richard ludas gitaron kaj Martha, naskiĝinte en Kolombio, kantas flamenke; ŝi ankaŭ instruis nin pri kastanjetoj.

[El *Telopeo* majo 2002]

Okcidenta Aŭstralio: Laŭ la aprilmaja numero de *La nigra cigno*, Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio havas 5 honorajn dumvivajn membrojn. Ensume estas 30 pagintaj membroj. La honoraj dumvivaj membroj estas Christopher Dean, Shirley Gradussov, Owen Loneragan, Vera Payne, kaj René Smeets.

Sudaŭstralio: Gratulon al nova mondcivitano!

De Alano kaj Jay Mooney, en Brisbane, naskiĝis mardon la 26-an de marto 2002, je la 1.22-a horo, 3,53 kilogramoj da belega knabo nomata John Keith.

Ni elkore gratulas ne nur la etulon, sed ankaŭ Alanon kaj Jay-n, dezirante longan kaj feliĉan vivon al ili ĉiuj.

[El *Tamen Plu*]

Viktorio: Universitato de Melburno: Ĉe la foiro de studentaj kluboj komence de la nova studjaro, videblis eksterulo apud la Esperanto-budo. Post amika saluto de la prezidanto de AEA en Esperanto, ekokazis simpla revaĵo: la nekonata eksterulo respondis, ankaŭ en Esperanto! Post plia inter-

parolado montriĝis ke la eksterulo fakte estas Jiri Baum, esploristo pri artefarita inteligenteco, ankaŭ membro de la klubo de sciencfikcio. Li ja parolas Esperanton sed same kiel la aliaj 21 interesatoj renkontitaj dum tiuj du tagoj, li ne havas la tempon praktiki.



Jiri Baum (eksterulo), Kam Lee, Jennifer Bishop



Malantaŭe, Paul Desailly
Antaŭe: Kam Lee, Jennifer Bishop, Errol Chick

Nekrologo: John Moore

verkis Kay Andersen

Forpasis dum januaro bone konata Esperantisto en Kvinslando, John Moore. John komencis lerni Esperanton per la Edukokursoj por Plenaĝuloj ĉe Rockhampton dum 1962. Por li, studi aliajn lingvojn estis tre kontentiga ŝatokupo; do li entuziasme partoprenis la Esperantokurson; kaj Norah, lia edzino, ankaŭ lernis. Post la fino de la kurso, li starigis Esperanto-grupon kiu kunvenis ĉiusabate.

En 1975, post sia emeritiĝo, li translokiĝis al Emu Park, marborda vilaĝo oriente de Rockhampton. Tie li starigis la grupon Kaprikorna Marborda Esperanto-Klubo; ĉiusabate okazis kunveno en lia hejmo kaj Esperantistoj el Rockhampton feliĉe partoprenis kiel ankaŭ Esperantistoj el la marborda regiono.

Li estis membro de Esperanto-Federacio de Kvinslando kaj tre volonte aranĝis la sukcesan 10an konferencon

de EFK ĉe Emu Park.

Inter 1978 kaj 1995 li estis la komisiito de AEA por korespondaj kursoj. Citaĵo el la libro *Historio de AEA* de Ray Ross diras: "John Moore plensukcese organizis kursojn je kvin niveloj, laŭ la studkapabloj de kursanoj. Helpgvidantoj en ĉiuj ŝtatoj ege kontribuas al la nuntempa [1985] bonstato de la kursprogramo." En 1995 li transdonis la taskon de komisiito al Hazel Green, sed li daŭrigis kiel kursgvidanto. Hazel deziras aldoni ke John estis bona kaj amikema kursgvidanto, kiu multe helpis ŝin.

Li estis la peranto en Aŭstralio por Skolta Esperanto-Ligo en 1974 kaj refoje de 1976 al 1984.

En 1986 John iĝis Fratulo de AEA.

Ni adiaŭas fidelan sinceran Esperanto-fraton kaj sendas kondolencon al lia familio. □



Interrete



• **El Ĉinio** nun legeblas la plej novaj informoj tutmondaj en Esperanto, ĉe <http://cri.esperanto.com.cn> Ĉisupre kiel la retpaĝo aspektis je la 3a de majo. Laŭinforme ĝiaj esperantlingvaj radioprogramoj devus esti aŭskulteblaj, ĉe la adreso

<http://online.cri.com.cn/radio4u/esperanto.html>, sed kiam mi provis je la 8a de junio, mi ne sukcesis aŭdigi ion ajn, ĉiuj ret-aŭdigprogramoj insistis ke la elsendoj ne estas deĉifreblaj, kvankam mi provis kaj per Windows-a kaj per Macintosh-a komputiloj, kaj per pluraj retlegiloj inkl. de Internet Explorer. — [d]

• **La Plena manlibro de esperanta gramatiko** de Bertilo Wennergren nun legeblas ankaŭ interrete, ĉe:

www.bertilow.com/pmeg/. Oni povas konsulti ĝin ĉe tiu adreso; se oni deziras, oni ankaŭ povas elŭti ĝin.

• **Citaĵoj:** Ralph Harry el Aŭstralio informis ke li havas projekton por helpi al aŭtoroj, per Internaciaj Citaĵoj. Temas pri projekto Vortoj kun Flugiloj. Li estis petita kontakti Sten Johannson-on por prezenti la verkon ĉe la ret-paĝo de EVA.

• **Informoj pri Esperanto-bibliotekoj** ĝenerale (kun aŭ sen komputile legeblaj katalogoj) troviĝas ĉe: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/v eb/bibl.html>. [Sed bedaŭrinde, neniu el la listitaj retadresoje efektive funkciis kiam mi provis ilin je la 8a de junio. — [d]]

[Laŭ Ret-info]

• **Wikipedio:** “Por la movado ĝenerale kaj por instruistoj speciale, gravas la nove kreskanta reta enciklopedio *Vikipedia* ĉe:

<http://eo.wikipedia.com>,

kien devus kontribui ĉefe instruistoj kaj utiligi ĝin ankaŭ por instruado kaj motivigo de lernantoj. Posedi en la reto Esperantlingvan informojn pri ĉiuj imageblaj temoj gravas por utiligo de la internacia lingvo, sekve ankaŭ kiel pruvo pri ĝia utileco. Ekde novembro 2001 aperis pli ol du mil artikoloj, kiujn eblas utiligi ankaŭ dum instruado.” — [Laŭ Retinfo]

Noto: la projekto estas utila kaj subteninda; sed avertigu ke la artikoloj en la Vikipedio ne estas nuntempe senescepte fidindaj nek ĉiam gramatike seneraraj. Ekz. pripensu la ĉisekvan kompletan tekston de artikolo titolita “Aŭstralaj”:

Aŭstralaj, ankaŭ nomataj *aborigenoj* laŭ la angla *aboriginals*, estas la unuaj enloĝantoj de Aŭstralio, malkovrinta la landon jarmiloj antaŭ ke tion faris la Eŭropanoj. Hodiaŭ, ili nombras ĉirkaŭ 40 mil

kaj parolas 50 lingvojn malsamajn.

En retpaĝoj nuntempe la kvanto da malbona esperantlingvaĵo estas vere tre seniluziiga. Ĉu nia “facila” Esperanto estas tiom “facila” ke oni ne povas gramatike verki en ĝi? Sed, sendube, anstataŭ primoki la jamajn artikolojn estas dezirinde kontribui al la Vikipedio pli bonajn. — [db]

• **La Aŭstralia Nacia Botanika Ĝardenaro** aperigis sian faldfoliojn en Esperanto en la Reto. La adreso estas <http://www.anbg.gov.au/anbg/esperanto/> La retpaĝo inkluzivas tre belajn kolorajn fotojn, kaj la esperanta teksto uzas unikodon. □

• **La Akademio de Esperanto** nun havas novan retejon ĉe: www.akademio-de-esperanto.org Oni povas legi tiuloke la tuton de la *Fundamento de Esperanto*, oficialajn informojn de la Akademio, planojn por nova Oficiala Vortaro, kc. Oni povas legi per unikodo aŭ aliaj metodoj, laŭprefere. □



POR RIDIGI VIN



Kruko, la vojaĝanta vendisto, alvenis al vilaĝo. Tie lia aŭto rifuzis pluveturi, kaj la sola mekanikisto diris ke daŭros ĝis la tagmezo de la venonta tago, antaŭ ol la aŭto ree funkcios.

La mekanikisto donis al Kruko la nomon kaj adreson de vidvino kiu dum la somero loĝigas turistojn.

Ĉar ne plu estis somero, nia Kruko estis certa ke libera lito haveblis tie. Kruko piediris la mallongan vojon al

la domo de la vidvino. Li prezentis sin al la neplujuna sinjorino. Ŝi rigardis lin, salutis lin kaj enirigis lin.

Post komuna manĝo — li estis la sola gasto — ŝi montris al li lian dormoĉambron.

“Mi devas averti vin”, ŝi diris, modeste ruĝigante kaj okulumante, “ke tiu pordo kondukas al mia dormoĉambro, kaj ke la seruro ne funkcias...”

“Tio ne gravas”, respondis Kruko, “mi metos seĝon kontraŭ la anson.”

(Kontribuita de Alano Mendelawitz)
[el *Tamen Plu*] □

Spertoj en Japanio

de Dianne Lukes

Lastatempe mi revenis de nia norda najbaro, Japanio kaj mi parolu al vi pri ĝi. Ne pri la mirinda beleco de la lando, nek pri la kortuŝa afableco de la popolo, sed pri la unika pozicio de Esperanto tie.

Kiam mi alvenis tien antaŭ unu jaro, mi sendis retmesaĝon al Osaka Esperanto-Societo, ke mi estas aŭstraliana esperantisto kiu havas postenon por instrui la anglan lingvon tie, kaj mi volas renkonti lokajn Esperantistojn. Tiel, mi baldaŭ ricevis multajn respondojn kaj invitojn al kunsidoj, laborejoj, kaj eĉ al propraj domoj. Entute, mi renkontis pli ol sepdek japanajn esperantistojn, kaj havis bonan oportunon gajni sperton pri ilia multvalora antikva kulturo, kaj mi ricevis ampleksan zorgon kaj helpon de ĉiuj. Elstare el multaj estis Profesoro Teraĵima Toshio, S-ro Takeuti Yosikazu kaj S-ro Takahashi Yuuki kiu estas junulo.

Toshio laboris ĉe Gubernia Universitato de Osaka. Li lekciis pri politikscienco tie jam de dudek jaroj. Li esperantistiĝis antaŭ multaj jaroj, kiam li estis studento, kaj estas bone konata en la japana Esperanto-movado. Lia universitato situas en ne tre granda distanco de mia apartamento, kaj mi povis marŝi tien. Li invitis min viziti lian studĉambbron ĉiusemajne por uzi lian komputilon kaj Interreton dum li lekciis. Ankaŭ ni ĉiam parolis Esperante pri multaj temoj. Ekzemple, ni interparolis pri la 11a-de-septembra katastrofo.

Yosikazu emeritiĝis antaŭ multaj jaroj. Li loĝas en Takatsuki, kiu estas

la ĝemelurbo de Toowoomba, kiu estas mia hejmurbo. Mi unue renkontis lin antaŭ pli ol dek jaroj, kiam li vizitis Toowoomban pro la inaŭgurado de tiu rilato. Ankaŭ ĉe la Universala Kongreso en Adelaide, kie aliaj aŭstralianoj sendube renkontis lin. Simile al la plejparto de japanoj, li estas tre laborema. Li estas unu el la estraro de la landa asocio kaj devas ĉeesti kunsidojn du fojojn en ĉiu monato en Tokio, kiu estas kvar horojn per trajno for de Osaka. Li ankaŭ estas tre okupata pro grava tasko por plibonigi la rilatojn inter Japanio kaj Ĉinio per komunikado kaj per vizitado al Esperantaj kluboj en tiu vasta lando. Li, simile al Toshio, tre ĝentile zorgis kaj helpis min.

Yuuki havis 15 jarojn kaj estis mezlerneja lernanto kiam mi unue renkontis lin ĉe Osaka Esperanto-Societo en majo de la pasinta jaro. Ili invitis min paroli pri miaj spertoj kiujn mi havis kiam mi vojaĝis tra Eŭropo per Pasporta Servo en 1996. Kompreneble mi parolis Esperante kaj iu tradukis en la japanan lingvon por komencantoj. Fakte, tio estis la unua Esperanta leciono por Yuuki, kaj kvankam li manpremis kun mi, tamen ni tute ne povis paroli kune tiam. Poste, kiam mi ĉeestis la Japanan Kongreson en la lasta oktobro, mi denove renkontis Yuukin. Tiam li povis paroli Esperanton klare kaj flue. Tio tre surprizis min Sed li ne povis paroli angle, do mi aranĝis ke li kaj tri aliaj ne-esperantistaj junuloj ĉeestu en privata klaso en mia apartamento tri horojn semajne por paroli angle. En marto li su-

biris anglalingvan ekzamenon ĉe la lernejo kaj gajnis 100 poentojn. Kiam mi forlasis Japanion en aprilo li pliboniĝis rilate al sia anglalingva parolado. Ni certe amikiĝis kaj li nomas min Ozimam (simila al “Ozibeef”, ĉu ne?!)¹

Mi parolis pri ĉi tiuj por montri al vi la fonton de miaj ideoj pri Esperanto en Japanio. Alia impona fakto estas ke ĉiuj japanaj junuloj lernas, devige, la anglan lingvon dum ses jaroj en mez-kaj altlernejo. Ili lernas gramatikon kaj sufiĉan vortostokon por sukcesi en ekzamenoj ĉiujare, sed la plejparto tute ne povas paroli ĝin je la fino. Eĉ tiuj kiuj bone sukcesas en ekzamenoj, ofte ne povas paroli ĝin kiam ili volas diri ion, kaj ne bone komprenas ĝin, kiam ili aŭdas ĝin.

Kiel Yuuki lernis Esperanton tiel

1. Por niaj eksteraŭstralaziaj legantoj: “Ozi” = Aŭstralio, “mam” = panjo, “beef” = bovviando. — [aB]

rapide? Ĉu li estas genio? Mi opinias ke ne (sed eble mi eraras!). Mi scias ke li penis kaj klopodis, sed mi opinias ke li lernis ĝin en nur kvin monatoj pro tio ke li antaŭe studis la anglan en la lernejo. Ankaŭ surprizis min kiel rapide li, poste, povis paroli kaj kompreni la anglan, post la lernado de Esperanto. Mi instruis multajn aliajn junulojn en mia laborejo kiuj ne lernis Esperanton, kaj ĉiuj ne pliboniĝis tiel rapide kiel Yuuki.

La japana registaro elspezas multe da mono por instrui la anglan al la popolo, sed bedaŭrinde ne bone sukcesas. Mi opinias ke ni proponu al la registaro uzi Esperanton por plibonigi la anglalingvan kapablon de lernantoj en altlernejoj. Eble tiamaniere Esperanto povus esti enkondukata al junuloj, kiuj mem povos poste uzi ĝin tra la tuta mondo. □

Mallonge

- **Duobligado:** Oni daŭre uzas duobligadon. Ekzemple, en novelo en *Monato* en Februaro, 2002, Alberto García Fumero verkis: “Jes, ververe ili ĉiuj aspektas kiel Sandra Mitchell”.

[Kontribus Ralph Harry]

- **Jacque Chirac**, prezidanto de Francio, la 15-an de aprilo 2002 skribis jenon al Vincent Charlot, konata franca esperantisto:

Kara Sinjoro,

Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemo de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi

jam scias, temas pri afero pri kiu mi estas sincere favora.

Eĉ se pro kialoj kiujn vi facile komprenos, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpatian por Esperanto kaj la humanista projekto kiu direktis ĝian kreigon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.

Mi opinias, miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco kiu estas nedisigebla de ĝi, estus

potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Estas tute sendube ke, se la serto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la Ministro de la Nacia Edukado, la demandon pri ĝia inkluzivo kiel elektebla lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la deziroj esprimitaj de de la gelernantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.

Mi petas vin kredi, kara sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj.

Plej kore.

Jacques Chirac

[El *Ret-info*]

• **La 3-a Staĝo “Astronomio: amatoroj kontribuas”** de Astronomia Esperanto-Klubo okazos inter 07-14 septembro 2002, en Sankt-Mikaela Observatorio, suda Francio.

La aranĝon organizas Astronomia Esperanto-Klubo, AEK, kiu estis fondita komence de 2000. La staĝo celas eduki la pli vastan Esperanto-publikon pri la plej antikva scienco — Astronomio.

En la Observatorio funkcias Centro de Astronomio, kiu regule organizas diversnivelajn staĝojn, akceptas grupojn el diversaj regionoj de Francio, okazigas konferencojn kaj faman someran Astronomian Festivalon. En la Centro disponeblas la plej unika speciala teleskopo en Eŭropo por observadi la Sunon.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

Astronomia Esperanto-Klubo, J. C. Rapley, 2 rue du Stade, FR-86410 Bouresse, Francio

Rete: astroek@yahoo.com [Laŭ *Ret-info*]

• **OpenOffice.org** estas senpaga programo por Windows 95/98/2000/XP elŝutebla ĉe www.openoffice.com. Ĝi konsistas el tekstprilabora programo kaj, ĝenerale, la aliaj specoj de programoj kiujn oni bezonas (datumbazo, grafikoprogramo, kc.). Ĝi kapblas uzi unikodon. Provinte ĝin, via redaktoro rekomendas ĝin, se vi deziras ion alian ol la Microsoft-oficej-programegon. Por fari la unikodajn literojn, oni aŭ uzu la tajpar-tabelon en la programo, aŭ la senpagan Esperantoliterprogrameton haveblan ĉe *ENK*.

• **Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj** estas la titolo de nova broŝureto de Robert Phillipson, eldonita de UEA kiel *Esperanto-Dokumentoj 37E*. Temas pri ideologia (kontraŭglobalisma) prezento.



**POR RIDIGI
VIN**



Kuŝis enlite virino en sia nova luata domo. Komencis la lito tre forte vibradi, kaj ŝi aŭdis la sonon de malproksima trajno. Tuj ŝi telefonis al la domposedanto kaj diris al li ke pro tiom da bruoj ŝi tute ne povas loĝi en tiu domo. Defendante sin la posedanto klarigis ke la fervoja stacidomo situas tre malproksime, kaj ke luanto neniam antaŭe plendis pro la bruego. Sed fine li konsentis veni kaj kontroli ĉu vere la bruoj tiom ĝenas. Alveninte al la domo li diris, “bone, en kvin minutoj venos vagonaro, tiam mi pruvos al vi, ke la brueto neniam ĝenetos.”

“Bone, eĉ bonege; kuŝigu apud mi sur la lito, kaj vi ekscios kiom vibregos la lito,” diris ŝi. Ili ambaŭ estis rigardantaj la plafonon, kiam eniris ŝia edzo

... Diris la domposedanto, “se mi klarigus al vi ke ni atendas la trajnon, vi supezeble ne kredus min?”

[El *Tamen plu*, kontribuita de Alano Mendelawitz]

Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

(1) En januaro, sed tro malfrue por la marta numero de *ĜK*, laŭ nia plenplora plejamara plej saga, plej senbeka, plej senpensa Reaktoro, naskiĝis en la Zoologia Ĝardeno de Perto nova bebo:



Ne fotis Odlo Bokserp

Ĵus naskiĝinta Baŭdina Kakatuo en Perto

Ĝia patrino forlasis ĝin antaŭ ol ĝi naskiĝis el la ovo, do ĝin prizorgas Diana Andersen, direktoro de la Zoo.

Ĉi tiu birdo estas inter la plej malmultaj tiuspecaj nun vivantaj — aliaj troviĝas nur en la sudokcidenta parto de Okcidenta Aŭstralio kaj la randoj de Perto.

¹ La redakcio de *ĜK* esperas ke ĝi estos deova esperantisto, la unua en Aŭstralazio. Tiucele ni urĝas ĉiujn Esperantistojn kiuj havas sombokojn de esperante blekantaj kakatuoj, eĉ alikontinentaj, sendi ilin por utiligo.

(3) Pro mia aktuala feriado en la Bermudoj, mi ne povis permane helpi la kompostadon de nia revuo. Sed amiko informis min ke laŭ paĝo 2 de la majo-junia numero, la Reaktoro petis ke oni sendu al li artikolojn sur Zip-disko 100 miligramama. Mi klopodis akiritian malmultepezegan diskon, por preskaŭnuligi la poŝt-sendokoston, sed vane. Ho Reaktoro, kiel vi povas ĝuste komposti la revuon sen mia helpo?...

(2) Multaj legantoj skribas al mi por teknikaj informoj, ĉar ili scias ke mi ĝuis tre grandan kvanton de sukcesoj dum la historio de la presarto. Lastatempe min atingis la ĉi-sekva letero:

Kara kaj plejglorata Odlo,

Unue mi volas gratuli vin pro via tre plaĉa prilaborado de mia nova libro. ... En ĝi, kiel vi sendube rimarkis, mi admiras vian laboron pri la ĉinaj monpaperfolioj. Ĉu vi povas informi min pri la ĝusteco de la lokigo de la ideogramo por 5, kiun vi metis en la centron de la 100-spez-folio?

Via respekto plene,

M. Polo

Prabeĵingo
1287-11-03

Nu, efektive mia disĉiplo Monotipfuŝ es

1. Artikolo enpoŝtigita ĉe Insulo Sankta Georgo, kaj alportita al York WA de leterkolombo.

**LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).

esperanto@education.monash.edu.au

Vicprezidantoj:

Franciska Toubale, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

franciska@bigpond.com

Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

hazgreen@twmba.net

Sekretario: John Gallagher, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

abcetc@ozemail.com

Vicsekretario: Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@iprimus.com.au

Kasisto: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Pitney@Cybernetint.net

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Prezidanto: Bradley McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 6087.

bradley@esperanto-lingvo.org

Sekretario: Howard Gravatt, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081.

brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

Abonoj ekster Aŭstralazio: €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2002 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2002 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Macintosh 7300, kaj Acrobat.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisionistoj

Vera Doloro, L.M.K.

[lia multsuferanta kontrolanto]

Kun la afabla helpado de lia mosto Marko Polo, provizore en Ĉinio